



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 4
1973

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
REDAKTORO: HANS AMUND ROSBACH

3-a periodo
40 a (49a) jaro
DUMONATA

La 43a Norvega Esperanto-Kongreso

Nia 43a landa kongreso okazis dum la tagoj 2.-3. de Junio 1973 en Haugesund. Pri la perfekta arango respondecis „Mara Vento”, la plej granda kaj solida klubo de Okcidenta Norvegujo kaj la dua plej granda klubo de la lando. Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estis Olav Thormodsen.

Verdire mi ne komprenas kial ni antaŭe neniam kongresis en Haugesund. La urbo havas belegan kaj tre centran situon en okcidenta Norvegujo, taŭgajn ejojn, kaj la klubo havas multajn kapablajn membrojn. La sola akceptebla kaŭzo, kiun mi trovas, estas troa modesteco!

Partoprenis proks. sesdeko da membroj el Oslo, Kristiansand, Bergen, Haugesund, Odda kaj Sauda, kaj krome tri rektaj membroj. La unua laborkunsido estis anoncita por la 11-a horo, sed iom malfrugis pro intervjuo flanke de la Norvega Radio kun la prezidantoj de N. E. L. kaj de „Mara Vento”, kaj ĝi daŭris ĝis la posttagmezo.

Sabaton vespere okazis la kongresa festeno en hotelo „La Mer”, (kie tre praktike logis preskaŭ ĉiuj kongresanoj, kaj kie ankau okazis la laborkunsidoj). Bonegaj mangajoj kaj trinkaĵoj. Kiel tostestro funkciis Johan Matland; festparoladis C. Støp-Bowitz, laude-sprite pri la urbo kaj ĝia aktiva Esperanto-klubo; sekvis spritaj paroladoj por la virinoj kaj por la viroj, kaj cetablaj kantoj,

parte laŭ tekstoj de Johan Matland.

Poste sekvis distra programo: recitado de Karen Berge, Hardanger-violon-ludo de majstro Norman Birkeli, serc-kanto de C. Støp-Bowitz kun akordiono. La dancadon poste interrompis la Ordena Proceso de Pro Merito. La procesio enmarŝis laŭ la marŝo speciale komponita por ĝi de Leif Sandberg kaj kiun perfekte ludis la dungita muzikisto. La Ordena Majstro promociis jenajn meritplenajn gesamideanojn: Komandoro de la dua klaso farigis Hans Amund Rosbach, Kavaliroj de la dua klaso Karen Berge, Olav Andersen, Arthur Bjørke, Else-Margrethe Müller, Thor Magnus Carlsen.

Okaze de la kongreso „Mara Vento” transdonis al Kampanjo Reister donacon cekon de kr. 500,00.

Dimancon antaŭtagmeze okazis la lasta laborkunsido. Posttagmeze oni ekskursis per privataj autoj tra la belegaj kaj historie tre interesaj cirkauaĵoj de Haugesund, i.a. oni transiris la Karmund-ponton al la Avaldsnes-preg-ejo, kie la onklo de s.ro Kjetland tre interese prelegis kaj klarigis. Fine plimulto de la eksterurbaj kongresanoj kolektigis ĉe ges.roj Sestak por kafotrinkado antaŭ la forvoĵago.

„Mara Vento” meritas sinceran dankon pro la ĉiel sukcesa arango.

Partopreninto.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ordinaraĵaj aŭtunaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1973. Instruistaj ekzamenoj oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda kaj Trondhejmo (la ekzamena komitato en Tromsø provizore ne funkcias). Oni anoncu sin per la presitaj skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ce kiu oni intencas fari la ekzamenojn, antaŭ la 1-a de Novembro. Personoj, kiuj faros la ekzamenojn ne en Oslo, plenigu po 2 - du - skemojn. Plenu la skemojn precize kaj komplete! - Aligoj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.

Jenaj helpiloj por sinpreparado al ekzamenoj estas aketeblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, postgironkonto 100.34:

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktadoj por elementa ekzameno. Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de l' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni acetos ce la Ekzamena Komisiono.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Støp-Bowitz
prezidanto.

Korespondu

Hungara studentino, kies "hobio" estas la norvega lingvo, satus interrilatiĝi kun norvega studento, kiu povus min helpi en la lernado de la norvega lingvo. Emma Kovács, Ménesi út. 11-13, 1118 BUDAPEST, Hungarujo.

17-jara hispana studentino deziras korespondi kun samaĝa norvega esperantist(in)o. Julia Maria Amunátegui, Bolonia 2, Parque de las Avenidas, MADRID 28, Hispanujo.

Ge-s.roj Bill kaj Eileen Olsen deziras korespondi kun norvegoj. Li estas inĝeniero, kaj liaj geavoj estis norvegoj. Ŝi estas poŝtoficeja teknikistino.

La adreso estas: 121 Dixon Str. Masterton, Nov-Zelando.

Pola filatelisto deziras kontakti kun norvegaj kolegiinoj. Deziras intersangi uzitajn polajn poŝtmarkojn, po 50 pecoj, kontraŭ alilandaj. Jan Ferenc, ul. Broniewskiego nr. 1 m.28, PL-62-510 KONIN 2, Polujo.

20-jara korea studento deziras korespondi kun vi kaj kolekti kion ajn. Gim Jong-col, 11 Tong i Ban 543, Don Am-Dong, Song Buk-Gu, 132, SEOUL, Koreujo.

29-jara inĝeniero de agrikulturo deziras korespondi. Intereso: ĝardeno, agrikulturo, naturo, vojagoj, geografio, sporto; sata bildkartojn, fotojn k.t.p.. Stanislav Kares, Tylova 1262, CS-508 Ol HOŘICE okres Jičín, Ĉeĥoslovakujo.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

PROVIZORA REDAKCIO:

Hans Amund Rosbach,
Johan Hammond Rosbach.

ADRESO DE LA REDAKCIO:

Nergt. 37c, 6500 Kristiansund

Lindato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.

ABONPREZO: En Norvegujo kaj eksterlando: n.kr. 12.-

ANONCPREZOJ: $\frac{1}{4}$ paĝo kr 150.-,
 $\frac{1}{2}$ p. kr 75.-, $\frac{1}{4}$ p kr 40.-,
 $\frac{1}{8}$ p. kr 20.-.



La PM-butiko

restas en Sarpsborg.

Provizora redaktoro.

Tiel staris sur nia gazeto dum unu tuta jaro 1946/47. Nun denove la situacio estas la sama. Ĉiu komprenas, ke tio ne estas dezirinda, kaj ni serioze esperu, ke ne tuta jaro pasos kun provizora redaktoro!

Mi povas klarigi kial la situacio estas nedezirinda:

Unue kaj ĉefe ĉar la provizora redaktoro ne povas elekti novan kurson kaj stampi la gazeton per sia persono. Li ja provizoras - kaj devas atendi, ke eble jam por la venonta numero iu nova transprenos. Tial vi ne povas esperi nek novajn ideojn nek grandajn ŝanĝojn dum la provizoreco.

Kial mi do ne akceptas fariĝi la nova ĉefredaktoro?

Simple ĉar mia libera tempo tion ne permesas. Kiel pastro mi ne havas liberajn tagojn, nek sabate nek dimanĉe. Kaj ĉiu tago estas plenplena da farenaĵoj. Samtempe mi jam estas redaktoro de uru esperanto-gazeto: La Skolta Mondo - kaj per tio jam pli ol sufiĉe uzas tempon, energion kaj ideojn

en redakta laboro.

Tio ne estas plendo. Tio estas klarigo, kaj la klarigo estas tre neceza, por ke vi ĉiuj - serioze - konsideru la situacion por trovi la novan redaktoron!

Ni daŭre kolektas uzitajn poŝtmarkojn por fortigi la ekonomion de Norvega Esperantisto. Nun la kaso estas malplena! Tial sendu pm. al la malnova adreso en Sarpsborg.

La butiko restas en Sarpsborg. Ni povas nun oferti:

1. Pm por po 10 øre.
2. Pm por po 20 øre.
3. Kovertetojn por po 5 kr.
4. Ĉinajn poŝtmarkojn.
5. Arabajn poŝtmarkojn.
6. Poŝtmarkojn laŭ temoj (flo-roj, bestoj, ŝipoj, pentraĵoj ktp.)
7. Pakaĵojn de 10 ĝis 100 kr.

Ĉi tie vi vere povas helpi. Multaj esperantistoj ja diras, ke ili povas nenion fari por la movado.

SPECIALA OFERTO: 25 kovertoj estas vendataj por po 10 kronoj. En 5 el tiuj kovertoj troviĝas - kiel aldona donaco - poŝtmarko, kiu valoras pli ol 5 kronoj. Ĉi tiu oferto validas ĝis la 1-a de oktobro.

Memoru! Ĉio pri poŝtmarkoj: adreso: SARPSBORG.

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna laboro. Nun komenciĝas nova studsezono, kaj la ĉefa tasko de ĉiuj kluboj kaj membroj estas starigi kursojn por eduki novajn esperantistojn. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesigantojn en studrondo, kiu povas lerni per la koresponda kurso; provu igi iun gazeton en via loko publikigi la gazetan kurson, kiu nun estas havebla kaj en matricoj kaj por ofsetpreso. Vidu ankaŭ la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Prelegvojaĝo Ciccanti. Kiam aperos ĉi tiu numero, la prelegvojaĝo verŝajne jam estos komencita. Vaste utiligu la "bruon" pri Esperanto, kiun ĝi kaŭzos!

Taskotabelo por kluboj. - Oktobro: La kluboj aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson), laŭeble oni sendu invitilon al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la Tago de U. N. O. - La kasisto sendas al N. E. L. (kaj al la distrikto) kotizojn kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono. Okazis du estrarkunvenoj kaj oni elsendis unu cirkuleron. Fondiĝis nova klubo en Grenland (Skien). La biblioteko estas nun plejgrandparte kolektita en la malnova oficejo en Nedre Slottsgt. 3, kie Stefan Murak komencis ordigi ĝin. La Ministerio pri Eksterro rifuzis peton pri vojaĝsubvencio al la Universala Kongreso en Beogrado. La rektoro de la metilernejo ĉe Sogn, Oslo, esprimis deziron ekinstrui Esperanton en la lernejo ekde la aŭtuno 1973. N.E.L. estis reprezentata per 254 voĉoj en la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto A/S. La reviziita unua parto de la koresponda kurso estas en preso. Oni daŭrigis la preparojn de la prelegvojaĝo de A. Ciccanti. La 43a Norvega Esperanto-Kongreso okazis en Haugesund 2.-3. de Junio.

La Liga Estraro.

PROTOKOLO

pri la ĝenerala kunveno de N.E.L. dum la 43-a Norvega Esperanto-Kongreso en Haugesund la 2.-3. de Junio 1973.

T a g o r d o:

1. Malfermo. En la nomo de la aranĝanta klubo „Mara Vento“ Olav Thormodsen bonvensalutis al la 43a Norvega Esperanto-Kongreso. La prezidanto de N.E.L., C. Støp-Bowitz, faris la malferman paroladon. Li dankis al la klubo en Haugesund pro salutvortoj kaj bona akcepto, kaj esprimis la esperon pri sukcesa kongreso kaj progresita laboro dum la venontaj 2 jaroj. Cetere li konstatis ke la intereso pri Esperanto estas rimarkeble kreskanta. En 1972 fondiĝis unu nova klubo, nome „La Vanelo“ en Bryne, kaj antaŭ kelkaj semajnoj fondiĝis klubo ankaŭ en Grenland (Skien).

Post la lasta kongreso en 1971 mortis pluraj membroj de N.E.L. kaj aliaj esperantistoj. La prezidanto laŭtleĝis iliajn nomojn kaj diris kelkajn memorigajn vortojn; oni honorigis ilin per mallonga silento. Niaj mortintoj estas:

Robert Dyhre, Sauda	Peter Rian, Skogns Markabygd
Ruth Olsen, Tromsø	Birger Reinertsen, Kristiansand
Ingolf Blikstad, Trondhejmo	Henry Fjeldahl, Skien
Anders Strai, Mandal	
Magnhild Undset, Unset	Åge Rolli, Leksvik
Øivind Lund, Askim	Hans M. Berglie, Oslo
Halvdan Karterud, Trondhejmo	M. Ø. Sem, Oslo.

Salutoj de jenaj kluboj estis transdonataj: Bergen per Åshild Birkenes, Gjøvik per C. Støp-Bowitz, Jørpeland kaj Sauda per Elna Matland, Kristiansand per Klara Bondarenko, Odda per Trygve Reissæter, Oslo per Thor Magnus Carlsen, Haugesund per Olav Thormodsen, Tromsø kaj Harstad per Saxer J. Ebeltoft kaj Trondhejmo per Sonja Jørgensen. Oni referis salutojn ankaŭ de Tharald Dybing kaj Otto Prytz.

2. Elekto de kunvenaj funkciuloj. Oni elektis jenajn funkciulojn: Protokolantoj: Johs. Sortland kaj Erling Vorland, ambau Haugesund. Kunvenprezidanto por la 1-a tago: Johan Matland, Sauda

por la 2-a tago: Olav Andersen, Sauda.

Elekta komisiono: Harde Danielsen, Oslo, Trygve Reissæter, Odda, kaj Olav Andersen, Sauda.

Komisiono por kontrolo de plenrajtoj kaj voĉnombrado: Gerd Jæger, Oslo, Sigurd Sørensen, Kristiansand, kaj Sigmund Blikshavn, Haugesund.

La kontrola komisiono poste prezentis sian raporton, kiu montris jenan dividon de la voĉoj:

Nombro da voĉoj:		Nombro da voĉoj:	
Bergen:		Johs. Sortland	4
Åshild Birkenes	4	Lovise Sortland	4
Lilly Davanger	5	Kjell Stokland	4
Trygve Davanger	5	Olav Thormodsen	4
Kr. Sivertsen	5	Erling Vorland	7
Leonora Sivertsen	5	Jørpeland:	49
Gjøvik:	24	Elna Matland	6
C. Støp-Bowitz	5	Kristiansand:	6
Haugesund:	5	Klara Bondarenko	7
Sigmund Blikshavn	7	Sigurd Sørensen	8
Henry Hermansen	4	Odda:	15
Ole W. Rønnevig	7	Trygve Reissæter	5
Jarmila Šesták	4	Oslo:	5
Vaclav Šesták	4	John Berggreen	16

Nombro da voĉoj:		Nombro da voĉoj:	
Else Bugge-Paulsen	16	Norman Birkeli	2
Rolf Bugge-Paulsen	16	Arthur Bjerke	2
Thor Magnus Carlsen	16	Elna Matland	3
Harda Danielsen	16	Johan Matland	2
Gerd Jæger	16		14
Halfdan Korstvedt	16		262
Signe Korstvedt	16	Rektaj membroj:	
C. Støp-Bowitz	16	Saxer J. Ebeltoft, Arendal	1
Sauda:	144	Karen Kluge, Stavanger	1
Olav Andersen	3	Lauge Madsen, Kapp	1
Karen Berge	2	Ensenditaj voĉoj:	3
		Grupo Esperantista, Trondh.	29
			294

3. Jarraportoj 1971 kaj 1972. Ambaŭ jarraportoj estis disdonitaj, kaj C. Støp-Bowitz lautlegis la 1972-raporton. Post kelka diskutado pri diversaj punktoj ambaŭ raportoj estis aprobataj.

4. Jarkalkuloj 1971 kaj 1972. Ankaŭ la jarkalkuloj de ambaŭ jaroj estis disdonitaj, kaj John Berggreen lautlegis tiun de 1972. Post kelkaj demandoj kaj klarigoj ankaŭ la jarkalkuloj estis aprobataj.

5. Alvenintaj proponoj (plialtigo de kotizoj, rezolucioj).

a) Plialtigo de kotizoj. La Estraro proponis jenajn plialtigojn de la kotizoj: Klubanoj ordinaraĵ al kr. 25, familiaj kr. 8, junulaj kr. 8, junaj familiaj kr. 3; rektaj membroj ordinaraĵ kr. 30; subtenantaĵ membroj kr. 45; dumvivaj membroj kr. 300 kaj 150. Elna Matland proponis ke la kotizoj por jenaj grupoj estu: klubaj familiaj membroj kr. 10, junulaj kr. 10, junaj familiaj kr. 5. Post kelka diskutado oni aprobis la proponon de Elna Matland, kaj por la aliaj grupoj la proponon de la Estraro.

b) Rezolucioj. Estis lautlegataj 3 rezoluciproponoj, unu de Johan Matland al organizaĵoj kaj unuopuloj kiuj laboras por internacia klublaboro, unu de John Berggreen al la norvegaj skoltaj kaj unu de Rolf Bugge-Paulsen al la kinejoj. Post kelka diskutado oni decidis elekti redakcian komisionon por iom prilabori la tekstojn. Post prilaboro de la komisiono (Elna Matland, Thor Magnus Carlsen kaj Olav Thormodsen) la tri rezolucioj estis aprobataj de la generala kunveno:

Rezolucio 1.

Opprop fra Norsk Esperanto-Forbunds landsmøte i Haugesund 2. - 3. juni 1973:

Det er etterhvert blitt flere og flere nasjonalspråk som ønsker å spille rollen som internasjonale. Å akseptere ett eller noen få av disse som internasjonale språk vil være i strid med de grunnleggende prinsipper i F.N.s menneskerettserklæring om likestilling mellom nasjoner og mennesker.

Den løsning som praktiseres idag, ved at f. eks. UNESCO, De Forente Nasjoners organisasjon for undervisning, vitenskap og kultur, må bruke 8 forskjellige språk i sitt internasjonale arbeid, er urasjonnell, og diskriminerer de små nasjonene mens de store privilegieres.

Løsningen av språkproblemet er det internasjonale språket som vil kunne anerkjennes av alle nasjoner. Det er lettere å lære enn noe nasjonalspråk og vil sikre språklig likestilling for alle mennesker i det internasjonale samkvem.

Norske esperantister samlet til landsmøte i Haugesund 2. - 3. juni 1973 oppfordrer alle organisasjoner og enkeltpersoner som arbeider for internasjonalt samarbeid, å gå inn for å få anerkjent Esperanto som eneste offisielle internasjonale språk og bruke språket i sine internasjonale forbindelser.

Rezolucio 2.

Opprop fra Norsk Esperanto-Forbunds landsmøte i Haugesund 2. - 3. juni 1973 til norske speidere.

Gjennom internasjonale leirer og andre former for internasjonalt samarbeide utfører speiderbevegelsen et arbeid som har stor betydning i bestrebelsene for å skape mellomfolkelig forståelse.

Språkproblemene utgjør en alvorlig hindring såvel for det organisatoriske arbeide som for mulighetene til å opprette og opprettholde direkte personlig kontakt mellom speidere fra forskjellige nasjoner.

Om 2 år holdes jamboreen for første gang i Norge. Norsk Esperanto-Forbunds landsmøte i Haugesund 2.-3. juni 1973 retter en sterk oppfordring til norske speidere om å lære det internasjonale språket Esperanto. Dermed vil de øke jamboreens betydning for internasjonal forbrødring.

Rezolucio 3.

Resolusjon fra Norsk Esperanto-Forbunds landsmøte i Haugesund 2.-3. juni 1973 til norske kinematografer.

Da bevegelsen for innføring av et nøytralt internasjonalt plan-språk - Esperanto - også innebærer beskyttelse av de nasjonale språk fortsatte utvikling på nasjonal grunn, en utvikling som i stigende grad trues av de store språke dominerende rolle i verdenssamkvemmet i forbindelse med lettsindig ettergivenhet og manglende aktpågivenhet fra de små språksamfunns side, henstiller landsmøtet til norske kinematografer å opprettholde den hevduvunne regel at filmenes titler skal annonseres på norsk i aviser og på vindusplakater.

I de senere år synes det å ha foregått en utglidning her idet den utenlandske tittel ikke er blitt oversatt eller er beholdt ved siden av den norske oversettelsen. Som eksempel peker vi på filmtittelen "A Clockwork Orange" som er fullstendig uforståelig for mange nordmenn.

6. Varbado de kursanoj. Oni diskutis nian varbagadon kaj varbmetodojn, kaj cu la antaŭaj rimedoj taugas hodiaŭ. Oni ankaŭ diskutis kiajn kursanojn ni deziras. La konkludo estis ke ni unuavice bezonas la junulojn. Ni devas fari precipaĵn penojn por kapti ilin, ekzemple per arango de specialaj kursoj, en diversaj junularmedioj. Ŝajnas ke kelkloke estas pli facile arangi studrondojn ol kursojn.

7. Ĉu denove dungi eksterlandajn kursgvidantojn? La Estraro deziris diskuton pri la dezirindeco kaj ekonomia ebleco de tia arango nun. Oni trovis ke portempe bedaŭrinde ne estas ekonomia ebleco. Seke ni devas koncentrigi pri norvegaj kursgvidantojn.

8. Edukado de norvegaj kursgvidantoj. Oni diskutis la eblecojn eduki norvegajn kursgvidantojn. Venis kelkaj proponoj, i.a. arango de mallongaj seminarioj por kursgvidantoj en konvena loko, au ke oni sendu aktualajn kandidatojn al la kursoj en Helsingør, eble kun stipendioj de Kampanjo Reiseter.

9. Membrigo kaj konservado de novuloj. Estas konata afero ke multaj kursanoj ne restas membroj de la kluboj. Oni multe diskutis kion fari por membrigi la kursanojn kaj por konservi ilin. Eble la formo de pia klubaktiveco ne estas la gusta hodiaŭ, kaj ke ni nun devas serĉi novajn vojojn. Montrigis ke tiuj, kiuj vere lernis Esperanton, tre malofte perdigas. Efika metodo por konservi la klubancjn tial estas bona instruado pri la lingvo kaj konstanta praktikado.

10. Elektio de Liga Konsilantaro, inkluzive de Estraro, anstataŭantoj kaj revizoroj. La kasisto, Karl Ekhaugen, kaj konsilantarano Steffen Kjetland ne deziris reelekton. - Rezulto de la elektoj:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz
Vicprezidanto: Kjell Gustavsen
Generala sekretario: John Berggreen
Sekretario: Signe Korstvedt
Kasisto: Aase Haube Nielsen
Estraranoj: Olav Rygg, Kirsten Ek
Anstataŭantoj: Harda Danielsen,
Otto Prytz, Nils Chr. Stenseth.
Aase Haube Nielsen kaj Ole J. Rønnevig estas novaj, la ceteraj reelektitaj. - Ĉefdelegito de U.E.A. estas Alfred Skyberg, Oslo, Komitatano A de U.E.A. estas Ludvig Anjer, Oslo.

Ceteraj konsilantaranoj:
Lars Kåre Hunnes, Trondhejmo
Per Johan Krogstie, Løten
Elna Matland, Sauda
Herolv Olsen, Tromsø
Ole J. Rønnevig, Haugesund
Revizoroj: John Selbekk, Aslaug Refsing.

Elna Matland kritikis la ĝisnunan metodon elekti Elektan Komisionon dum la generala kunveno, en kiu ĝi funkciis. Tia komisiono estas tute labormalkapabla pro manko de tempo. Ŝi proponis ke oni nun elektu Elektan Komisionon por la venonta generala kunveno, tiel ke ĝi povu fari la necesan laboron antaŭ la kunveno. Oni samopinias pri tio kaj elektis jenan Elektan Komisionon por la generala kunveno 1975: Elna Matland, Sauda (prezidanto), Thor Magnus Carlsen, Oslo, Per Johan Krogstie, Løten.

11. Eventualaĵoj. Oni decidis sendi jenan admonon al la Norvega Radio:

Henstilling til Norsk Rikskringkasting.

Norsk Esperanto-Forbunds landsmøte - samlet i Haugesund 2. - 3. juni 1973 - henstiller til N.R.K. å sende via Norsk Fjernsyn kursur i det internasjonale språket Esperanto.

Det finnes et fullt innspilt kursur - laget av TELEAC i Nederland. Vi ber om at også norske seere må få anledning til å lære Esperanto via fjernsyn.

Olav Andersen dankis al la Estraro pro ĝia nelacigebla laboro por la movado, pro la laboro, kiun ĝi faris kaj faros.

La prezidanto, C. Støp-Bowitz, direktis dankon al la du, kiuj nun forlasis la estradon, nome kasisto Karl Ekhaugen kaj konsilantarano Steffen Kjetland. Ili faris ambaŭ bonan laboron. - Cetere li dankis al Johan Matland kaj Olav Andersen, kiuj lerte gvidis la kunvenon, kaj al "Mara Vento" pro perfekta arango de la kongreso. Fine li dankis al ĉiuj kongresanoj pro aktiva partopreno.

Johs. A. Sortland.

Erling Vorland.

Pri la nova "vesto" skribas leganto: "Laŭ mia opinio la distanco inter la linioj estas tro malgranda... Mallongajn liniojn, do du kolonojn en ĉiu paĝo, mi preferus."

Al tio ni povas nur diri, ke la poŝtkarto alvenis tro malfrue por influi al tiu ĉi numero, sed nenio teknika malhelpas al pli granda interspaco inter la linioj.

Kiu volas helpi?

Blinda esperantisto en Oslo serĉas helpanton, kiu volus legi al li Esperanto-literaturon. Telefonu al: Karl Balla, 60 75 79.

Ni serĉas ankaŭ bonvolajn helpemulojn, kiuj estas pretaj legi Esperanto-librojn sur sonbendojn por blindaj samideanoj. Oni povas turni sin al N.E.L., Boks 942, Oslo 1.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FEROJISTA
ASOCIO - NEFA
Kaldbakstubbens 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek.



Mallonge el «Jernbanemanden»

LA PLEJ RAPIDA VARTRAJNO DE
LA MONDO.

La francaj ŝtataj fervojoj tre fieras pri la t.n. Foussillon-ekspreso. Tiu vartrajno ek de la fino de 1971 trafikis la 920 km. longan linion Perpignan - Parizo je rapido de 140 km. po horo.

LONGA TRAJNO.

La plej longa trajno iam veturigita de la aŭstralaj fervojoj estis trajno ŝarĝita per karbo, kiu veturigis de la minejoj en Goonyella al Hay Point en Queensland. Ĝi estis 2500 metrojn longa, kaj la pezo estis 10400 tunoj.

"NE ELUZEBLAJ" FEROJRELOJ.

En Leningrado elproviĝis nova tipo de reloj, kiuj ne eluziĝas eĉ post ŝarĝigado de unu miliardo da tunoj. La reloj, eĉ la plej bonaj, kiuj nun aplikiga, devas esti anstataŭigataj post ŝarĝigado de 250 miliono da tunoj. Esploristoj en Leningrado proponas hardigadon de la reloj per altfrekventa elektra kurento. Provagregatoj estas jam konstruitaj por tiu celo.

160 KM. PO HORO TRA TRAKFORKO AL
FLANKENIRANTA TRAKO.

La francaj ŝtataj fervojoj konstruis trakforkon, kiu kaj por flankenirantaj kaj por rekte antaŭen-

irantaj trajnoj permesas rapidon ĝis 160 km. po horo. La longo de ĉi tiu trakforko estas 250 m.

RADIOINSTALAĴOJ EN GREKAJ
LOKOMOTIVCOJ.

La grekaj ŝtataj fervojoj konsideras instaladi radioekipaĵon en la lokomotivoj por plibonigi la komunikadon inter la personaro en la trajnoj kaj la stacioj.

DORMVAGONOJ POR GRANDA RAPIDECO.

La hispanaj ŝtataj fervojoj komencis provveturadon de nova halgo-trajno kun dormvagonoj. La provoj okazas laŭ la linio Madrid - Barcelona, kaj oni atingis rapidecon de 222 km. po horo.

ELEKTRIZADO EN POLLANDO.

La polaj ŝtataj fervojoj energie elektrizadas siajn liniojn, kaj je la fino de 1972 4000 km. de la linioj estis elektrizitaj. Tio estas 17 % de la tuta reto. 45 % de la var- kaj person-rafiko efektiviĝas laŭ ĉi tiuj linioj.

DISTINGILOJ FORIĜIS EN AŬSTRIO.

De la fino de 1972 la aŭstria fervojistoj ekuzas novajn uniformojn, kiuj koncerne fason kaj garnituro fakte preskaŭ similas al civila vestaĵo. La malnovaj rangodistingiloj anstataŭiĝis per malgranda metalŝildo fiksita sub la cebrusta poŝo.

SUNAJ KONGRESTAĜOJ EN BEOGRADO

Suna Jugoslavio, lando de diverseco kaj frapaj kontrastoj, estis ĉi-jare elektita kiel kongreslando, kaj pli ol kvardekon da nacioj reprezentis la proks. 1600 gekongresanoj, kiuj kolektiĝis en la kongresurbo Beogrado.

Jam vendredon grandnombre alvenis kongresantoj el diversaj mondpartoj, kaj en la sabato daŭre alfluis homoj kiuj dum semajno ĝuu la kunecon kun gesanoj multlandaj.

La interkoniĝa vespero havis lokon en granda, centre situanta restoracio "London", kaj partoprenis ĝin proks. 1000 personoj, kiuj plenigis ĉiujn ejojn. Regis la kutima vigla etoso, zumis babilado kaj sur la dancoplanko moviĝis dancparoj ĝis post noktomezo.

Kongresejo estis "Dom sindikata" ("Sindikata domo"), kaj en la salonego Zamenhof en tiu domo kolektiĝis proks. 1600 kongresanoj al la solena inaŭguro de la 58-a UK de Esperanto. La kongreson malfermis prof. ing. Momčilo V. Saponjić, la prez. de LKK, salutante ĉiujn kongresanojn. Viceprez. de UEA, s-ano E. Carlen, esprimis bedaŭron, ke la prez., prof. Ivo Lapenna, ne povas partopreni la kongreson. Li transdonis salutojn al landaj kaj urbaj gravuloj, i.a. alla Alta Protektanto, prezidanto de SFR Jugoslavio, Josip Broz Tito.

Poste salutparoladis s-ro Veljko Milatović, prez. de la federacia konferenco de socialista unuigo, dezirante sukceson al la kongresa laboro, kaj s-ro Zivorad Kovačević, vicprez. de la magistrato de Beogrado, kiu ankaŭ esprimis plej bonajn dezirojn por la kongreso.

Sekvis nun salutoj de reprezentantoj de ambasadoj. En la nomo de la nordaj landoj salutis l. sekretario de la finna ambasado, s-ro Kärkkäinen. Estis informite,

ke partoprenis la kongreson i. a. 65 japanaj esperantistoj kaj pli ol 100 el Usono.

Post muzika ero salutis knabo en la nomo de la infankongreseto, kaj sekvis la longa vico de salutoj nome de Landaj Asocioj aliĝintaj al UEA. En la nomo de NEL salutis prof. Olav Reiersøl, Oslo. Estis salutoj ankaŭ de landaj asocioj nealiĝintaj al UEA, kaj de landoj sen Esperanto-movado.

Festparoladis d-ro J. Wells salutanta la kongresurbon kaj landon. Li atentigis i.a. pri tio, ke en Genevo 35 ministroj devos interkonsenti pri rimedoj por larĝigi ekonomiajn kaj sciencajn interŝanĝojn kaj por igi pli libera la fluon de homoj kaj ideoj. Por tio oni bezonas komunan lingvon. En la kosmo baldaŭ ekorbitos satelitoj kapablaj dissendi televidaajn programojn samtempe al la tuta homaro aŭ al gravaj partoj de ĝi. Por tio, se ni volas eviti novan tiranecon de la plimulto, oni bezonas komunan lingvon. Ni proklamas, ke la solan racion solvon de la problemo prezentas la alprenado de la Internacia Lingvo, diris s-ro Wells.

Multe da eroj, laboraj kaj festaj, plenigis la semajnan programon - kaj la kultur-aranĝoj ĝenerale estis je alta nivelo. La jugoslavanan vesperon ĉeestis pli ol 1500 personoj. Kulturarta societo "Vukica Mitrović" kaj alia ensemblo prezentis rondodancojn kaj kantojn el ĉiuj regionoj de Jugoslavio. La programo estis varia kiel la lando mem - kaj la publiko danke aplaudegis. Kelkaj gejunuloj konkuris en la arto oratori, kaj la l. an premion gajnis junulo el Nov-Zelando.

La unua ĝenerala kunveno de UEA okazis sub prezido de prof. Boja Popović. La tagordon konsistigis du ĉefaj partoj: Salutoj de fakaj organizaĵoj kaj Estrara raporto

1972/73. Oni ĝenerale diskutis la raporton, parolis pri la laboro de la delegitoj kaj cetere estis pridiskutata eldono de steloj, transpagaj problemoj ktp. Estis plendoj pri ricevo de la Kongresa Libro nur post alveno al la UK.

La duan ĝeneralan kunvenon prezidis E. Carlen, kaj la temo estis "Lingva egalrajteco en teorie kaj praktiko". Prezentiĝis interesaj raportoj pri la lingvostato en landoj plurlingvaj.

En la kadro de la Internacia Somera Universitato okazis nombro da diversspecaj, interesaj prelegoj - kaj la kongresanoj montris sian intereson pri la temoj.

Kiel kutime kunvenis multaj fakaj asocioj. En publika kunveno de la juristoj la temo estis "Sociala asekuro laŭ juro de la diversaj landoj". El Norvegujo raportis Tom Arbo Høeg, Oslo.

La Belarta Konkurso altiris 250 ĉeestantojn el 30 landoj, kaj la premiitajn poemojn, prozon kaj dramon legis kaj deklamis ges-oj Emilija Lapenna, Roger Bernard kaj Alec Venture. Nova talento en la Konkurso estis Kjell Walræmoen, Norvegujo.

La oficiala bankedo kun 350 personoj okazis en hotelo Metropol, kie ankaŭ estis la kongresa balo. Al la balo venis pli ol 1000. Iudis alterne beograda orkestro kaj slovaka kvarteto.

Jaŭde aro da aŭtobusoj transportis kongresanojn al belaj regionoj de Serbio dum la tradiciaj ekskursoj.

Ŝatata programo estis la Varia Vespero, kunskeĉoj, kantado, mal-

nova japana luktoludo ktp. Ankaŭ la Internacia Vespero havis tre riĉenhavan programon.

Ni plue menciuj, ke okazis akcepto ĉe la urbestro de Beogrado, Branko Pešić, estis teatra prezentado, filmvesperoj, Junula Vespero kaj en kunveno oni debatis: "Ĉu Esp. povas sukcesi sen lokaj grupoj?"

Estis aprobite deklaracio pri la lingva problemo en rilatoj inter la popoloj, adresita al la popoloj de la mondo, iliaj ŝtataj parlamentoj kaj politikaj partioj por pritrakto kaj prikonsidero.

Ĉiuj jugoslavaj radiostacioj raportis pri la kongreso, okazis ankaŭ televidaj elsendoj, kaj la ĵurnaloj donis atenton al la manifestacio de la esperantistoj.

La Solena Permo okazis en etoso de disiĝo. Oni faris resumon pri laboro kaj decidoj, dankis kaj bondeziris por la 59-a en. Hamburgo.

Dum nia unua tago en la kongresurbo ni vane serĉis Esperantajn indikilojn surstrate, kaj mankis granda Esperanto-flago sur la tegmento de la kongresejo. Ankaŭ ĉe la staci-domo mankis signojn de la kongreso, kaj per tio perdiĝis bona okazo por propagando.

La kongreso enhavis aron da trajtoj ĝojigaj, kun speciala ĝojo ni notis la multajn gejunulojn.

La norvega grupo travivis belan kaj interesan aŭtobusvojaĝon kiun aranĝis Turisma Servo de NEL kun Kari Kalsås kiel bona, prizorgema gvidantino.

Ĝis revido en Hamburgo en 1974. oto

Ĝojiga novaĵo!

Jus atingis nin REVISTA PORTUGUESA DE ESPERANTO, numero 1, jaro 1 de gazeto de Portugala Esperanto-Asocio, kiu sur paĝo 3 ĝojkrias Hallelujah!, ĉar tiu Asocio fine estiĝis. Per oficiala letero de la 10-a de aprilo la Ministerio de Nacia Edukado aprobas la statutojn kaj tiel la Asocion.

Gratulon! Kaj bonvenon!

JUBILEOJ

Lif Berg 75-jara.

Lektoro f.ino Lif Berg, Trondheim, farigos 75-jara la 6an de Septembro. Si estas multjara aktiva membro de Grupo Esperantista kaj Fakdelegito de U.E.A. Estante gimnazia lektoro pri lingvoj si ankaŭ multe kontribuis al la renomo de Esperanto en lernejoj rondo. Ni sincere gratulas!

Olav Reiersøl 65-jara

La 28an de Junio prof. d.ro Olav Reiersøl festis sian 65-jaran naskiĝtagon. Ni postfeste sincere gratulas!


F. Faulhaber 80-jara

La 8an de Aŭgusto la konata nederlanda esperantisto, membro de Akademio de Esperanto, F. Faulhaber, farigos 80-jara. Kvankam parte paralizita li energie daŭrigas sian laboradon por Esperanto. Ni elkore gratulas!

KAJ

Vilho Setälä honora doktoro

La 31an de Majo la konata finna esperantisto, membro de Akademio de Esperanto, magistro Vilho Setälä, promociiĝis honora doktoro de la Universitato de Helsinki. La promocianto citis kiel meritojn de Setälä, en internacia teritorio liajn esperantologiajn studojn, apud liaj studoj statistikaj kaj tipologiaj pri finna lingvo kaj kreado de finnaj terminoj por la moderna tekniko.



Turistbroŝuro pri Gotenburgo

La Turisttrafika Asocio de la (sveda) Okcidenta Marbordo ĵus eldonis tre belan turistbroŝuron pri Gotenburgo, kun urboplano kaj multaj utilaj informoj, en modela Esperanto. Oni povas peti ĝin senpage de: Oficejo de Turismo, Parkgatan 2, S-411 38 GÖTEBORG, Svedujo. - Gotenburgo estas la sola urbo en Skandinavio, kiu havas Esperanto-placon.

Kaj pri Århus

La Turistasocio por Århus kaj Ĉirkaŭaĵo, adreso: La Urbodomo, DK 8000 Århus C, eldonis 24-paĝan plurkoloran broŝuron kun vere utilaj informoj pri vidindaĵoj kaj pri trafiko, plezuro, bankoj ktp, ne nur pri la urbo Århus mem sed ankaŭ pri ĉirkaŭaj urboj kaj distriktoj, ĝis la insuloj Samsø kaj Anholt.

Nordlandet kirke

en Kristiansund prezentiĝas per ofsetita broŝuro kun multaj bildoj kaj mallongaj informoj pri la preĝejo en la lingvoj norvega, angla, germana, franca kaj Esperanto. NRK en sia distrikta programo priparolis la broŝuron, kiu uzis la Esperanto-tekston por havigi plej korektajn ailingvajn tradukojn.

El Svedujo

alvenis broŝuroj ankaŭ de Norrköping (senpage havebla ĉe Stads-kansliet, Rådhuset) kaj de Skövde. Ambaŭ estas allogaj, plurkoloraj kaj informaj.

Turku

en Finnlando sendis pli modestan nigre/blankan falditan broŝuron, kiu informas pri la baldaŭ 700-jara urbo kaj ties multaj interesaĵoj. Senpaga - adreso Kaupungin Matkailutoimisto Finnlando, Turku, Linnankatu 8.

Konkurso Simondetti 1973

Ĉiujare la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) aljuĝas sian Premion Simondetti de 1000 belgaj frankoj (aŭ egalvaloro en libroj), al elstara artikolo originala aŭ tradukita, pri la tre ĝenerala temo „Naturo“. Por 1973 partoprenis ĉi-sekvaj kvin kandidatoj, laŭ malkreska vicigo, el kiuj la unua sekve gajnis:

E.W. Chandler el Aŭstralio kun „La Lovano“
G.Gárdonyi el Rumanio kun „Nia Cikonio“
G.Pollard el Aŭstralio kun „La

Recenco

JARLIBRO DE U. E. A., UNUA PARTO. Nur por Individuaj Membroj. Kr. 30,00. Mendu ĉe la Ĉefdelegito, A. Skyberg, Østensjøvn. 118a, Oslo 6.

La Jarlibro estas sendube la plej utila manlibro de la esperantistoj, antaŭ ĉio pro la listo de la Delegita reto - unika en la mondo, kiel prave fieras U.E.A., kaj kiu plenumas preskaŭ la tutan volumon. Guste la Delegita sistemo impresas ankaŭ la neesperantistojn. Ĉi-jare ĝi ampleksas entute 3556 Delegitojn, Vic-, Junul- kaj Fakdelegitojn en 65 landoj. Ni ne komprenas ke esperantisto kuragas transpasi landlimon sen la Jarlibro en la poŝo.

La geografio de U. E. A. estas iom kurioza: la portugala provinco Acoroj estas listigita kiel aparta lando, dum Respubliko San Marino aperas sub Italujo, sed tio estas malgravajoj. Pli interese estas konstati ke komencas aperi pluraj el la „novaj“ landoj de Afriko.

La Indekso de Fakdelegitoj estas aranĝita en nova maniero, sed mi dubas ĉu la nova arango prezentas avantaĝon.

Cetere oni trovas listojn pri la Komitatanoj, Estraranoj, su-

Emuo"

A. Liszy el Hungario kun „Observo de birdaro“

G. H. Atanasov el Bulgario kun „Murhirundo“

Ĉiuj partoprenantaj artikoloj aperas konforme al la regularo en „La Mevo“, organo de ORE, kaj rajtas pritrakti iun ajn best(ar)on aŭ plant(ar)on. Kandidatoj por la konkurso 1974 bonvolu peti la regularon al la sekretario M. Halvelik, Gebr. Blommestraat 41, B-2200 Borgerhout, Belgio.

perrigardon de la Centra Oficejo. pri kotizoj k.t.p.. En la dua parto aperos aliaj interesaj kaj gravaj listoj kaj informoj.

Al ĉiu, kiu deziras ekhavi utilon el sia scio de Esperanto, mi forte rekomendas fariĝi Membro kun Jarlibro.

C.S.-B.

La kontorfondiĝo.

Pli frue	kr. 614,10
R. Bugge-Paulsen	" 30,00
I. Dahl	" 11,75
Gerd Jäger	" 20,00
C.S.B.	" 20,00
H. Danielsen	" 15,00
	<u>kr. 710,85.</u>

La Propaganda Fondaĵo.

La Esp.klubo de Bergen kr. 50,00.

Kampanio Reiserter.

Pli frue	kr. 1500,00
Gerd Jäger	" 100,00
Erling Vorland	" 100,00
Olav Thormodsen	" 100,00
„Mara Vento“	" 500,00
O. Børresen	" 200,00
C. Støp-Bowitz	" 100,00
	<u>kr. 2600,00</u>

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

sep novaj demandoj

Sur paĝo 40 vi trovis (n-ro 3) la unuan eron de Duparta Konkursoserio. Por via informo: Vi povas respondi tiujn demandojn ĝis 1-a



de oktobro, kiu estos la limdato por la unua ero. Kaj vi ne bezonas respondi al ĉiuj demandoj, sed kolekti poentojn ĝis la fino de la serio. Cetero legu la



regulojn en la pasinta numero. Kaj bonvolu grandnombre partopreni, ĉar ni bezonas kaj tiun kontakton kun la legantoj kaj la eventualan kotizon.

Jen la novaj demandoj:

2. Stranga beko de stranga birdo. La nomo de la birdo?



Ne multaj portas tian ĉapelon en nia tempo. Kiel nomiĝas tiu serio-heroo?

4. En la ŝlosilo de la poŝtmarko troviĝas la leteroj CEPT, kiujn vi

povas trovi ankaŭ sur norvegaj poŝtmarkoj. Kion signifas CEPT?



1. Sur parteto de landkarto vi vidas partojn de tri landoj. Por helpi vin ni lasis la leterojn Da ĉe urbo en unu el la landoj, kaj la finaĵon -ia de la landnomo de alia.

Kio estas la nomo de la tria el tiuj landoj?

3. Elegeanta sinjoro, kiun vi certe renkontis en iu gazeto.



5. Mondfama muzikisto kun sia violono. Lia nomo?

6. Itala komponisto, kiu mortis en 1924. Kiel li nomiĝis?

7. Indiĝeno el Sabah. Kie estas Sabah?



Norvega Kroniko

OSLO

Klubkunveno 8/5 1973.

Ĝi okazis en la universitato en Blindern - tre granda kaj bela konstruaĵo. La vicprezidanto Th. M. Carlsen bonvenigis. C. Støp-Bowitz faris paroladon pri: "La evoluo de la homoj". Li montris desegnaĵojn kaj lumbildojn kaj skizis la evoluadon de formiĝis la unuaj vivantaj estaĵoj ĝis formiĝis la nunaj homoj - evoluo kiu ja daŭris dum certe centoj da milionoj da jaroj, kaj ankaŭ dum kaj inter pluraj glaciperiodoj. Trovitaj fosilioj kaj restaĵoj de ostoj kaj kranioj donis multe da informoj pri ĉi tiu evoluo. La spaco ne permesas pli detalan priskribon de ĉi tiu interesa parolado.

Th. M. Carlsen referis notojn en "Heroldo" i.a. pri la aŭtobus-karavano al U.K. en Beogrado de Oslo.

Raportis Odd Kolbrek

Klubkunveno 21/5 1973.

La prezidantino bonvenigis nin. Laŭ informo de Kari Kalsås aliĝis sufiĉe multaj por ke la aŭtobus-karavano al U.K. en Beogrado povu okazi. La programo "Prestro minutoka", prezentita de Th. M. Carlsen, temas pri kiamaniere en la plej bona maniero propagandi, ekzemple pere de abonado de eksterlandaj esperantaj gazetoj, aplikado de la stelo kaj de Esperanto dum la turista sezono kaj dum vojaĝoj eksterlanden. Li menciis, ke dum la televidprogramo "Ĉu vi memoras?" sukcesis al Th. Smådahl paroli pri Esperanto. Pri kelkaj punktoj de la tagordo de la landa kunveno en Haugesund oni poste diskutis - kiamaniere membrigi kaj konservi novulojn.

Raportis Odd Kolbrek

Kluba ekskurso al Oxval 14/6.

Ankaŭ ĉi tiu jare Eva kaj Carl Støp-Bowitz invitis la klubon al

sia somerdometo en Nesodden. Iu speciala programo ne estis. Ni interbabilis kaj kantis kun tir-harmonika akompano de C. Støp-Bowitz. La prezidantino referis leteron de Karlstad Esperantoklubo pri aranĝo por esperantistoj en "Morokullien" la 17-an de junio, kaj admonis la anojn partopreni. Ĉeestis 20 ano kaj 2 gastoj.

Raportis Odd Kolbrek

Kluba ekskurso al Tyrifjorden 23/6 1973.

Jam estas bela tradicio, ke la klubo festas la vesperon de sankta Johano en la somerdometo de s-ino Else Bugge Paulsen ĉe la Tyrifjordo. La vetero estis varma kaj bela, kaj dum la vespero estis tiel kvieta, ke ni povis bruligi fajron, malgraŭ ke la arbaro estis tre seka.

Ĉeestis 32 ano kaj 4 gastoj, kaj ni kantis kaj dancis akompanataj de R. Grotmål, C. Støp-Bowitz kaj E. Wollbek. Tempon por babilado, manĝado kaj trinkado ni ankaŭ havis. Kelkaj eĉ banis sin. Tiel ni ankoraŭ foje pasigis neorges-eblan tagon. Koran dankon al nia klubanino Else, nia ĉarma gastigantino, kaj al ĉiuj kiuj volonte helpas ŝin.

Raportis Pepita

Lastmomente venis al ni "Avizo pri Internacia Esperanto-Instituto", kiu nun reorganizigis.

La nova estraro, pere de J. H. Vink, klarigas pri la malsaniĝo de estiminda s-ro Cseh, kiu ne volis akcepti helpojn al la administracio, pro kio la aferoj de la institucio malordiĝis. Al multaj leteroj ne eblos plu doni respondojn. Pli malbone estas, se fakturoj estas nepagitaj aŭ mendoj neplenigitaj, kaj la Instituto petas informojn pri tio.

Samtempe la Instituto petas, ke vi informas pri ŝuldoj - eble pro mankantaj fakturoj aŭ pro enkasigita mono ne ensendita.

x

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

La dua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj okazos de la 4a ĝis la 25a de Aŭgusto 1974 en la modernaj ejoj de la Universitato de Lieĝo. La programo ampleksos la studdirektojn socio-lingvistiko, biologio kaj ĥemio.

PROGRAMO:

Jam estas deciditaj jenaj kursoj:

Planktono kaj mara produktado (Enrique Balech, prof. pri mara biologio, Argentino).

Fundamentaj konceptoj en ĥemio (Sin'itiro Kawamura, prof. pri biologa ĥemio, Kagawa, Japanujo).

Enkonduko en organikan kaj biologian ĥemion (S. Kawamura).

Novaj manĝaĵoj (S. Kawamura).

Enkonduka kurso pri algoj (Ralph A. Lewin, prof. pri mara biologio, La Jolla, Usono).

Utilaj kaj malbonfaraj algoj (R. A. Lewin).

Enkonduko en ĝeneralan biologion (C. Stöp-Bowitz, prof. pri zoologio, Oslo, Norvegujo).

Elementa ekologio (C. Stöp-Bowitz).

Segmentumitaj animalaj grupoj (C. Stöp-Bowitz).

La limdisciplinoj de la lingvistiko (I. Szerdahelyi, prof. pri Esperanto, Budapeŝto, Hung.).

Socilingvistikaj studoj (I. Szerdahelyi).

Kontaktologio (I. Szerdahelyi).

La S.U.K.-estraro intertraktas kun pluraj universitataj profesoroj el diversaj landoj pri pliaj kursoj.

Kotizoj, por 1, 2, 3 semajnoj, studentoj: belgaj fr. 2400, 4000, 5000; aliaj personoj: b.fr. 3500, 6000, 8000.

Stipendioj: Disponblas subvencioj. I. a. 2 stipendioj de „In-

stitucio Hodler 68" de po b. fr. 6600. -Personoj kaj institucioj, kiuj deziras ebligi al studentoj partoprenon en SUK-1974, povas tiucele starigi stipendiojn.

Kurstekstoj. Por daŭre kontribui al la scienca literaturo en Esperanto oni publikigos ankaŭ la tekstojn de SUK-1974. El la tekstoj de 1972 daŭre estas livereblaj: Maas: Enkonduko en la komputeran lingvistikon; Stöp-Bowitz: Bazaj nocioj de biologio; Tadokoro: Farmakologio por malbonuzo de medikamentoj.

Norsk Esperanto = Forbund

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro: 100.30.

Kontoradresse: General Birchs-gate 30, Oslo. Tlf 69 14 39.

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30 - 16.30.

Turisma servo: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.32.

Esperantoforlaget a/s

ELDONEJO ESPERANTO A/S

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro: 100.31.

Kontoradresse: General Birchs-gate 30, Oslo. Tlf 69 14 39.

ĈEFDELEGITO

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 133.29

REDAKCIO

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N. Telefon 77 620

EKSPEDEJO

Boks 942, Oslo 1.

ØKONOMI-TRYKK, Postboks 24, 8001 BODØ